Prelego en KAEST, novembro 2012

# La Biblioteko de Interkultura Centro en Herzberg am Harz…la Esperanto-urbo

La **Interkultura Centro Herzberg (ICH)** estas komuna agado de Esperanto-Societo Südharz, de Germana Esperanto-Asocio (GEA) - Filio por Klerigado kaj Kulturo kaj de la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI). La laŭjura posedanto de tiu ĉi fakbiblioteko (certe unu el la plej grandaj en la mondo) estas la Esperanto-Societo Südharz. Parto el tio estas privata ludonaĵo. La biblioteko troviĝas en Interkultura Centro Herzberg (ICH) en Grubenhagenstrato 6 en DE-37412 Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo (germane: Herzberg am Harz – die Esperanto-Stadt). Dum la tuta jaro ĝi estas alirebla, vizitebla. Por grupoj ni petas antaŭanoncon. La honoroficaj deĵorantoj povas vin eĉ fake konsili. La biblioteko kaj arkivo estas je dispono por legantoj, studemuloj, fakuloj.

**La biblioteko** vere ofte estas uzata kaj servas al la lernantoj kaj esplorantoj. Tie ankaŭ okazas asociaj kunvenoj, kursoj, klerigseminarioj, ktp. Estas kontentige scii, ke la biblioteko rekte servas al la uzantoj, ja tiom malfermitaj bibliotekoj estas raraj en la Esperanto-movado. Ne nur la bazaj kolektaĵoj, sed ankaŭ la duoblaĵoj estas konstante prilaborataj, ordigataj kaj katalogataj. Dank al la bonega kunlaborado kun la urba administracio de Herzberg am Harz…la Esperanto-urbo la duoblaĵoj kaj ceteraj arkiv- kaj varbmaterialoj estas deponitaj en duĉambra stokejo en la subtegmentejo de la malnova urbodomo. Unu el la celoj estas, ke plua, sed publika Esperanto-fakbiblioteko kun informcentro ekfunkcii kaj estu je dispono por interesiĝantoj en Herzberg am Harz…la Esperanto-urbo. Eble oni volas tion atingi parte per la nova "Fondaĵo Esperanto-urbo Herzberg".

La biblioteko de Interkultura Centro Herzberg prezentas specon da scienca fakbiblioteko kune kun fakarkivo. Al la arkivo apartenas pli ol 20.000 diversaj eldonoj de (fak-)gazetoj, regulaj informiloj kaj magazinoj el multaj landoj, kongreslibroj, jarlibroj, pli ol 1000 diversaj turismaj broŝuroj, variaj Esperanto-filatelaĵoj, pli ol 500 diversaj sonmaterialoj (diskoj, kompaktdiskoj, sonbendoj, sonkasedoj, ktp.), malnovaj bildkartoj, varbiloj, pingloj, varbglobkrajonoj, varbafiŝoj, malnovaj fotoj, lumbildoj (diapozitivoj), ktp.

**Iom pri la historio, ekesto kaj konsisto de la kolektaĵo:**
Libroj: la nuna kvanto de ĉ. 9000 libroj ekestis el kunmetado de pluraj kolektaĵoj konsistantaj el almenaŭ kelkcent libroj. Intertempe la privata parto de la kolektaĵo superas pli ol 3000 diversajn librojn. Al tio ankaŭ apartenas signifa kolektaĵo kun lingvistikaj kaj interlingvistikaj faklibroj. Krome ankaŭ ekzistas kolektaĵo kun vortaroj kaj lernolibroj en pli ol 100 diversaj lingvoj (inkluzive minoritataj lingvoj).

**Filmoj:** jam en la sepdekaj jaroj de la lasta jarcento oni komencis kolekti ĉiujn haveblajn esperantrilatajn vidbendojn kaj ankaŭ etformatajn filmojn (Normal 8 kaj Super 8). La unika kolektaĵo ampleksas pli ol 300 filmojn laŭ diversaj ĝenroj (kategorioj). Lasttempe ni zorgas pri arkivigo, ciferecigo de tiuj ĉi filmoj kaj transigas ilin al pli modernaj formatoj, nome KDoj kaj DVDoj. Per tio ni atingis certgradan konservadon kontraŭ teknika perdiĝo. Tiel ekestis speciala kolektaĵo kun t.n. sekureckopioj, kiuj ĉiutempe senprobleme estas uzeblaj kaj pruntedoneblaj.

**Aliaj unuoj:** unu el la antaŭaj kolektantoj konservis preskaŭ ĉiujn esperantrilatajn materialojn, ekz. flugfoliojn, librojn, afiŝojn, poŝtmarkojn, bildkartojn, ktp. La diversspecaj materialoj ne estis ordigitaj, sed almenaŭ estis kunmetitaj en diversaj kolektujoj.

La plej multaj materialoj de la ICH-biblioteko ekde aŭtuno 2004 troviĝas en tri ĉambroj. En la seminaria ĉambro troviĝas la privata librokolektaĵo. En la dua t.n. biblioteka ĉambro oni trovas la bibliotekon de la asocio. En la tria, pli eta ĉambro en skatoloj, kolektujoj sur bretaro trovis sian lokon la riĉa gazetkolektaĵo. En la koridoro ni disponigas **pedagogiajn-didaktikajn materialojn**. Tiu speciala kolektaĵo jam superas pli ol 300 verkojn. Tie troviĝas kelkaj libroj, fakaj eldonaĵoj en pluraj ekzempleroj, ke ni havu sufiĉajn por lecionoj, lerngrupoj kaj studademuloj. Do, la partoprenantoj en kursoj, studadsesioj ne devas tuj aĉeti librojn, surloke povas pruntepreni kaj uzi por lernceloj. Tio helpas ankaŭ al gejunuloj. La biblitotekto estas en konstanta uzo, estas lernejo por studentoj kaj aliaj lernemuloj. En apuda proviza ĉambro (stokejo) troviĝas diversspecaj teknikaj helpiloj kaj aliaj rezervaj materialoj, oficejaĵoj, ktp..
Pro la fakto, ke la Filio por Klerigado kaj Kulturo de Germana Esperanto-Asocio (GEA) sub kompetenta gvidado okazigas tie ĉiujare 5-7 **fakseminariojn**, ĉiam regas vigla etoso en "vivanta medio". Tio garantias al "surlokaj " gestudantoj la plej bonajn uzadkondiĉojn. Same gastoj, ekz. aŭtodidaktoj kaj praktikantoj (staĝantoj) estas bonvenaj. Ĉiujare nemalmultaj eksterlandaj gestudentoj dum kelkaj monatoj restadas ĉe ni, kiuj ankaŭ povas uzi la bibliotekon kune kun la fakarkivo. Ĉiuj servoj de la biblioteko estas senpagaj.

Kiel ni jam menciis, nia biblioteko kolektas ĉion kaj estas ankaŭ **arkivo kaj eta muzeo**. Pro tio ni akceptas ĉiuspeceajn donacitaĵojn kaj ordigas, katalogas, listigas ĉion. Dum la lastaj jaroj ni ricevis ampleksajn donacojn (librojn kaj gazetojn) ĉefe el Germanio sed ankaŭ el eksterlando. Dank al signifaj donacoj de pli ol 80 personoj kaj asocioj la librokvanto multe ampleksiĝis. Ofte ni ricevas samtitolajn librojn, ekz. lernolibrojn kaj vortarojn. La duoblaĵojn ni uzas por t.n. Dua Kolektaĵo. La triajn kaj ceterajn ekzemplerojn ni uzos por estontaj interŝanĝoj kaj per donacado subteni aliajn kolektantojn aŭ studemulojn. La ampleksigon de la kolektaĵoj ni atingas ankaŭ per aĉetoj kaj interŝanĝoj. Tiel en la libraro aperis el la frua fazo de la Esperanto-literaturo (antaŭ la Unua Mondmilito) multaj valoraj verkoj, kelkaj el ili enhavas eĉ personajn aŭtogramojn, etajn skribaĵojn, salutojn de la aŭtoroj mem, ekz. de Julio Baghy. De L.L. Zamenhof ni posedas tri aŭtografojn. Rilate al gazetoj ni strebas je kompletigo de gravaj gazetoj: "Germana Esperantisto", "Scienca Revuo", "Der Esperantist", "Eventoj" „IPR", "Juna amiko", "Monato" kaj pluraj aliaj ekzistas en kompleteco.

**La kolektaĵoj** estas ordigitaj en bone serĉeblaj „Excel-tabeloj", tamen ankoraŭ ne laŭ la gravaj bibliotekaj ordignormoj. El nia vidpunkto ni plenumis la ĉefcelon, ĉar nun ni povos apartigi la duoblaĵojn kaj la uzantoj de la biblioteko povas facile uzi la katalogajn listojn. La tabeloj ebligas komfortan uzadon, ekz. laŭ aŭtoroj, laŭ titoloj, eldonjaroj, eldonejoj, paĝnombroj, ktp. Ni ankaŭ pripensas novordigadon laŭ lingvosciencaj normigkriterioj kaj inter niaj celoj estas la ebligo de uzado en pli videbla, pli vaste alirebla formo, ekz. per interreto. Bedaŭrinde ankoraŭ mankas al ni la resurcoj, tempo, homforto.

La Esperanto-biblioteko en ICH en Herzberg am Harz…la Esperanto-urbo dum la lastaj jaroj multe kreskis kaj nun apartenas al plej grandaj kolektaĵoj en la mondo. Ni organizis ĝin, tute sen publikaj subtenoj. Multe ni dankas al volontuloj kaj dum la lastaj ok jaroj ankaŭ al tiuj senlaboruloj, kiuj laŭ la germana labordona sistemo rajtis kaj povis trovi per t.n. labor-centroj helplaboron ĉe komunutilaj asocioj, kluboj, eklezio por eta rekompenco, po unu eŭro per horo. Interkultura Centro Herzberg en kunlaboro kun la regiona labor-centro helpis al laborserĉantoj kaj post iom da trejnado, sub faka gvido ili helpis ĉe ordigado kaj listigado. Bedaŭrinde daŭre mankas kompetentaj honoroficaj helpantoj kun bonaj scioj de Esperanto kaj Esperanto-literaturo.

Grava atingaĵo en Herzberg estis la akiro de „Esperanto-ĉambro" en decembro 2009 en la bela **kastela muzeo**, kie eblas ekspozicii esperantaĵojn, materialojn laŭ temo, laŭ aktualeco. Dank al bona kunlaboro kun la urbo, la muzeo kaj la Esperanto-Centro aldoniĝis nova oferto al la muzeo: serio de porokazaj, ĉ. duonjare ŝanĝitaj ekspozicioj el la materialoj, kolektaĵoj de la ICH-biblioteko kaj per tio ekestis vigliĝo de eventoj en la muzeo. Ni tre fieras pri la ĝisnunaj

**fakekspozicioj** en la historia Welf-kastelo de Herzberg am Harz, ekz. pri „La vivo de Zamenhof",“Infana Literaturo en Esperanto“, „Mondliteraturo en Esperanto“, „125 jarojn Esperanto“, „Solidarecŝtonoj el la tuta mondo por Herzberg am Harz…la Esperanto-urbo“, ktp. En ĉiu ekspozicio ni prezentas kelkajn vere valorajn raraĵojn kaj unikaĵojn.
Laŭ la muzea statistiko tiuj ekspozicioj estas allogaj, certe jam vidis ilin pli ol 30.000 vizitantoj el Germanio kaj el multaj aliaj landoj dum la unuaj tri jaroj.
Pro la fakto, ke en Herzberg am Harz ekzistas diverstipaj „Esperanto-servoj“, ekz. biblioteko, arkivo, muzeo kun fakekspozicioj, GEA-klerigejo, ktp., en la Esperanto-urbo ni povis krei multajn bonajn daŭripovajn modelojn por la nuntempa Esperanto-movado.

Inter niaj celoj estas ankaŭ la vigligo de interagado kun aliaj Esperanto-kolektaĵoj, bibliotekoj. Jam en la jaroj 2006 kaj 2007 ni ofertis en Herzberg specialajn **seminariojn por Esperanto-bibliotekoj; kolektantoj,** ĉar ni opinias, ke devus esti multe pli da fakkontaktoj inter la alilandaj Esperanto-bibliotekoj, Esperanto-muzeoj, Esperanto-Centroj, Esperanto-kolektantoj, ktp. Tiuj-ĉi fakseminarioj traktis unuecigon de kataloglaboro, vojojn al publikigo, trarigardis, kiu partnero kiujn materialojn kolektas, prizorgas. La kunvenoj helpis la konsciigon pri taskoj, fakaj defioj, problemoj kaj pri la bezono je kunagado, interŝanĝo de ideoj, spertoj akiritaj dum katalogado kaj aliaj bibliotekaj laboroj. Ni iniciatis kaj strebas krei funkciantan reton de partnereco, kiu kunplektas urbojn kun aktive laborantaj Esperanto-centroj, bibliotekoj, muzeoj, ktp. kaj elektis la nomon **PUNTO (PartnerUrba Nodo-TeksaĵO)**, kiu ja indikas la celon: kunlaboron sur pluraj terenoj, kunligitecon per multaj fadenoj, interagadon sur multaj vojoj, fortigi unu la alian kaj krei platformon por planado de komunaj projektoj en la estonto.

La biblioteko de Interkultura Centro Herzberg daŭre kreskas kaj estas malfermita al vasta publiko. Ĝi funkcias kiel kursejo, prelegejo, kunvenejo, eventejo por memortagoj, festoj, fakaj kunsidoj, libertempaj aktivecoj. Ĝi ludas gravan rolon en la urba vivo kiel **informcentro** pri Esperanto kaj lingvorilataj temoj. Ĝi servas kiel centro por kultureventoj kaj kiel organiza centro ofertas siajn servojn al la germana kaj internacia Esperanto-movadoj. Ĝi estas t.n. metiejo, kie la diversaj specialkolektaĵoj servas lingvoinstruadon, studcelojn, klerigkursojn.

Kun danko ni akceptas ĉiutipan **helpon, volontulojn, materialojn, mondonacojn** por daŭrigi la ordigadon, pretigi pli kaj pli akuratajn katalogojn, akiri novajn eldonaĵojn, plivastigi la servojn, plifaciligi retan aliron de la katalogoj, konservi materialojn en elektronika formato, per ciferecigo, skanado, ktp.

En la biblioteko funkcias **pruntoservo**, laŭ interkonsento. La biblioteko ne havas oficialajn malfermhorojn, sed estas preskaŭ ĉiam atingebla, ĉar la Esperanto-domo estas ankaŭ loĝejo kun bone funkcianta retkonekto kaj telefono. Tamen, prefere anoncu vian alvenon, ĉefe se temas pri grupa vizito. Studemuloj povas resti pli longe, laŭ interkonsento ankaŭ eblas tranokti kaj pasigi studtempon, staĝon ĉi tie. Kontakto: http://ic-herzberg.de
Vizitu la bibliotekon, partoprenu eventojn kaj malkovru la Esperanto-urbon Herzberg.

**Aldonaĵo**
Kelkaj **statistikaj datumoj** (stato: marto 2013):

- **Libroj** ĉ. 6600 diversaj + 2.700 en privata kolektaĵo
- **Gazetoj** pli ol 20.000
- **UEA-jarlibroj** ekde 1910
- **UEA-kongreslibroj** ek 1906
- **IFEF-Kongreslibroj** ek 1949
- **GEA-Kongreslibroj** ek 1912
- **Sondiskoj**: 25 kaj 53 (pivatkolektaĵo)
- **Sonbendkasedoj**: 203 kaj 109 en privata kolektaĵo

-**KDoj** (*CDs)* pli ol 300 (nekompleta katalogo)
-**Filmoj** (VHS kaj DVD) pli ol 300 (nekompleta katalogo)
-**Turismaj broŝuroj el la tuta mondo**: ĉ. 1000 ekz.
-**Turismaj broŝuroj el Germanio**: 335
-**Bildkartoj**: kelkcent, skanitaj. Katalogo laŭ temoj, nekompleta
-**Varbglumarkoj**: plurcent, skanitaj, katalogo nekompleta
-**Gazetartikoloj pri Esperanto**: kelkcent, ekde 1910, ordigitaj laŭ jaroj, skanitaj
-**Gazetartikoloj el la regiono** pri resp. per Esperanto, pli ol 900, ordigitaj laŭ jaroj, skanitaj (multaj gazetartikoloj de la lastaj jaroj troviĝas ankaŭ sur la hejmpaĝo de la urbo Herzberg Pressearchiv Esperanto http://herzberg.de/magazin/iarchiv.php?menuid=378&topmenu=7&keepmenu=inactive)
-**Insignoj, medaloj, afiŝoj, kalendaroj, fotoj, lumbildoj (diapozitivoj), varbiloj, informfolioj** kaj multaj aliaj diversspecaj Esperanto-objektoj.



Foto: parto de la biblioteko (seminaria ĉambro)

**<u>Aŭtoroj:</u>**

*Zsófia Kóródy* (Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz…la Esperanto-urbo Zsofia.korody@esperanto.de), hungardevena diplomita lingvoinstruistino (ankaŭ por Esperanto, ELTE, Budapeŝto), GEA-komisiito por instruado, AGEI-prezidanto, Vicprezidanto de ILEI

*Peter Zilvar* (Grubenhagenstr. 8, DE-37412 Herzberg am Harz…la Esperanto-urbo Andragogo (*Fernuni* Hagen), interlingvisto (AMU Poznano/PL), komisiito de Germana Esperanto-Asocio por Klerigado kaj Kulturo